

Annette von Droste-Hülshoff,  
Mi scias, ho Sinjor'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sinjoro, estas sur la tero  
Amar' kaj duro tiom da,  
Malsentas mi en la sufero  
Bonecon Vian ofte ja.

Sed kredas mi, ke pelos for  
La nokton radiado Via,  
Ke diros iam buŝo mia:  
Bonigis ĉion la Sinjor'.

*Traduko de la Germana poemo "Ich weiß, o Herr" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-155-306 (2004-02-04 14:20:00)*